Reĝa Belga Ligo Esperantista

NACIA KONGRESO EN ANTVERPENO
(24-25-26an de Majo 1947a)

Estimata Samidean (in) o,

Kiel vi scias, la unua postmilita BELGA KONGRESO okazos, dum la Pentekostaj tagoj, en Antverpeno.

La programo estas finpreta kaj multaj malnovaj kaj ankaŭ novaj membroj de la Ligo jam sendis sian aliĝon al la Organiza Komitato. Ĉiuj partoj de la Lando kaj ĉiuj grupoj senescepte estos reprezentataj.

Sed nun urĝas :

1. Tiuj, kiuj ne jam aliĝis, sendu NEPRE sian kotizon Fr. 40.- (Fr.50 por la prokrastontoj,) al la L.K.K., pagante la sumon per P.Ĉ.K. I700.I0 de Maur. Jaumotte, 44, De Bruynlaan, Wilrijk.
2. Tiuj,kiuj jam pagis, kaj tiuj, kiuj intertempe estos pagintaj sian kotizon, resendu SENPROKRASTE la ĉi kunan mendilon kaj faru la rilatan pagon per sama vojo al la sama adreso.

Jen resumo de la P R O V I Z O R A _ P R O G R A M O :

SABATAON la 24-an : Je la I6-a horo : Delegacia vizito al la enterigejo de Schoonselhof. Demeto de floroj sur la tombojn de Frans SCHOOFS, fondinto de "La Verda Stelo", kaj de Louis DE HONDT, administrinto-delegito de Belga Esper.-Instituto.
Je la I7-a: Demeto de floroj ĉe la Monumento al la Militmotintoj de ambaŭ Militoj, kontraŭ la Nacia Banko.
Je la I8-a: Kunveno de la akcioloj de Belga Esp. Inst.
Je la I9-a: Kunveno de la membroj de I.E.L. (E.E.A.)
Je la 20.30u/:Intima interkonatiga kunsido, kun montro de filmoj, rilatantaj al kongresoj kaj Esper.-okazaĵoj.

DIMANĈON la 25-an: Je la 9-a horo : En la Ĉefpreĝejo : Sankta Meso, kun prediko en Esperanto de Pastro De Mayer.
Je la IO-a : Solena Kunsido de Belga Ligo. Jubileo de " La Verda Stelo".
Je la I2-a : Akcepto en la Urbdomo - Komuna fotografado.
(Ne-oficiala manĝo, privata aŭ intime aranĝota de la L.K.K.)
Je la I5-a : Laŭ plaĉo kaj elekto :
a) Vizito al la Zoologia Gardeno kaj al la du tuneloh sub la Skeldo (por piedirantoj kaj por aŭtomobiloj)
b) Vizito al la Haveno per " Flandria"-boato kaj al la du tuneloj sub la Skeldo.
Je la I9.30 u. : Oficiala Fest a Manĝo.

LUNDON la 26-an : Je la 9-a horo : Tuttaga ekskurso al DOEL, sur la Orient-Flandria Skeldo-bordo, proksime de la Nederlanda landlimo kaj al LILLOO, la iama fortikaĵo. Iro perŝipe kaj reveno per elektra tramo, aŭ inverse.

La L.K.K. insistas pri TUJA resendo de la mendilo kun klara indiko de la prezo antaŭvidata por la ĉambro en hotelo; de la nomo kaj rilato de la persono kun kiu loĝo okazos en sama ĉambro, kaj de la nombro de noktoj, unu aŭ du.

Kun antaŭdanko kaj kora saluto,

Gis baldaŭa revido.
Por la Loka Kongresa Komitato
La Prezidanto

Maur. JAUMOTTE.

M E N D I L O (T U J RESENDOTA : 44, De Bruynlaan
= = = = = = = Wilrijk-Antwerpen)

La subskribinto (nomo,antaŭnomo) . . . . . .

(kompleta adresso) . . . . . .

KIU VOJAĜOS kun . . . . . .

mendas la jenon : (prefere unu mendilo por ĉiu kongresano)

KOTIZO : Fr. 40. (por la prokrastontoj Fr.50) Fr.

HOTELO : Noktoj 24-25an - kaj - 25-26 an de Majo
Prezoj : 60 ĝis 75 frankoj por unu nokto kaj persono (oni aldonu 10% por la trinkmono) Fr.

La Matenmanĝon oni mendu en la hotelo mem.

OFICIALA FESTENETO dimanĉa : Fr.90 (kun trinkmono enkalkulita,sed ne la trinkaĵoj) Fr.

VIZITOJ: Vizito al la haveno kaj la tuneloj) fr.25 Fr.
Vizito al Zoologio kaj la tuneloj)

EKSKURSO al Doel-Lilloo (ŝipo kaj tramo) Fr. 35 Fr.

TAMANĜO en Doel (kun trinkmono) Fr. 60 Fr.

POŜTKARTOJ PRI ANTVERPENO (3 serioj de dek kun Esper. teksto) : Fr. IO. Fr.

Fr.

kiujn mi ĝiras samtempe al P.Ĉ.K. I700.IO de Maur. Jaumotte

Samideane

(Subskribo) . . . . . .